

N° 02
1967


G.L.GIMELLI


# ITALA fervojisto

Organo
Associazione
Italiana
Ferrovieri
Esperantisti









IFEA

## 19-a KONGRESO DE LA INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO-FEDERACIO "IFEF"

En FULDA (Germanio) de sabato la 6-a de majo ĝis vendredo la 12-a de majo
Adreso de L.K.K.: 19-a IFEF-Kongreso, poŝtfako 700746, D-6 Frankfurt (Main) Germanio. Bonvolu nepre distingi inter la koresponda kaj banka adresoj.
Banko: Eisenbahn Spar- und Darlehnskasse Frankfurt (Main) konto-n-ro 40051.
Poŝtĉekkonto: Kiel supre: konto-numero 56908 Postscheckamp Frankfurt (Main)
Kongresejo: Oranĝerio en la parko de la rezideja palaco en Fulda.
Kongreskotizo: Ĝis 20-a de aprilo 1967: 38 germ.mark. Por pensiuloj, edzinoj kaj junuloj (malpli ol 19-jaraj) la sumo estas la duono, do 19 G.M.
Simbola aliĝo: Por personoj, kiuj ne povas partopreni la kongreson, eblas aliĝi kiel simpatiuloj. Post aliĝo ili tuj ricevos 25 glumarkojn, post la kongreso la kongreslibron kaj la kongresinsignon. Minimuma kotizo 8 G.M.
Glumarkoj: La dukolora glumarkoj montras la kongresejon. Unu folio (25 glumarkoj) kostas 1 G.M. plus 20 pfenigojn por sendkostoj, aŭ entute tri internaciajn respondkuponojn. Bonvolu mendi ĉe L.K.K.
Kongreskarto: L.K.K. forsendas la kongreskarton post valida aliĝo.
Kongreslibro: La aliĝintoj ricevos la kongreslibron laŭeble en aprilo. Kongresanoj, kies aliĝo atingos L.K.K. post la 31-a de marto, ricevos la kongreslibron nur en Fulda.
Esperanto-stratoj: En la kadro de la kongresa programo estos inaŭgurataj du Esperanto-stratoj, unu en Fulda mem kaj alia en la ekskursloko Hilders (Rhön). Ofertos sin unika okazo de du ceremonioj, kies gravecon L.K.K. propagandos per sia informa servo.
Loĝiga servo: L.K.K. rekomendas al tiuj, kiuj deziras loĝi en malpli kostaj tranoktejoj, aliĝi kiel eble plej baldaŭ, ĉar la nombro de tiuj litoj jam estas limigita.
Kongresa programo: En la kongreslibro troviĝos nur provizora programo. La kompleta programo estos disdonata en Fulda kun la ceteraj dokumentoj.
Filatelio: Germana Esperanta Fervojista Asocio (G.E.F.A.) eldonas filateli an specialkoverton, sur kiu troviĝos la trikolora kongresemblemo. La koverto estos afrankata per poŝtmarko de 0,30 G.M. kaj stampata per speciala poŝtstampo. Vendado okazos dum la kongreso en Fulda.
Ceteraj aferoj: Ni ne povas ripeti ĉiujn publikigaĵojn aperintajn ĝis nun en "La Internacia Fervojisto". Por tio estas konsilinde studi la antaŭajn eldonojnde "L.I.F." antaŭ ol turni al L.K.K. Kun ĝojo L.K.K. konstatas, ke laŭ la ĝisnunaj aliĝoj kredeble la 19-a IFEF-Kongreso estos bone vizitata. La aliĝontoj volu tamen konsideri, ke partopreno nur en unuopaj tagoj limigos la valoron de la tuta kongreso.

## 52-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

TEL AVIV (Israelo), 2 - 9 Aŭgusto 1967-a

SUB LA ALTA PROTEKTADO DE LA ISRAELA ŜTATPREZIDANTO, S-RO ZALMAN ŜAZAR.

La Ministerio pri Internaj Aferoj de Israelo informis,ke la partoprenantoj de la 52-a U.K. ricevos senpage la enirvizon por Israelo. La enirvizo estas petenda ĉe la Israelaj diplomatiaj reprezentantoj en eksterlando ne pli frue ol tri monatojn antaŭ la komenciĝo de la Kongreso.
Dua Bulteno: La Dua Bulteno estas jam sendita al ĉiuj aliĝintoj. En ĝi troviĝas ĝeneralaj informoj pri la Kongreso kaj ĉiuj mendiloj.
Loĝado: Pro ĝia graveco ni deziras ankoraŭ foje atentigi la interesiĝantojn, ke L.K.K. povos akcepti mendojn por loĝado nur ĝis la 1-a de majo 1967-a. Post tiu dato L.K.K. ne plu povos certigi loĝadon. Personoj, kiuj intencas aliĝi al la Kongreso post tiu dato, devas tion nepre atenti kaj zorgi pri sia loĝado pere de vojaĝoficejo en sia lando.
Klimato: Ŝajnas ke multaj homoj timas troan varmon dum la kongresa periodo Ni atentigas, ke Tel Aviv ĉiam havas iom da agrabla vento de la maro kaj ke ĉiuj hoteloj, aŭtobusoj kaj aliaj ejoj estas klimatizitaj. La kongresanoj de Tokio scias, ke en tiaj cirkonstancoj eĉ granda varmo ne ĝenas!

Foto-Konkurso: Ni atentigas, ke la konkursaĵoj devas atingi antaŭ la 1-a de julio 1967 la jenan adreson: 52-a U.K. de E., P.O.Box 1289, Tel Aviv, Israelo. La temo de la ĉijara Foto-Konkurso estas: "Moderna Arkitekturo ( en ligo kun la Jaro de Internacia Turismo)". Notu bone! Ni atentigas ke, kontraŭe al informo en la Dua Bulteno, la formato de la fotoj devas esti ne maksimume sed minimume 13x18 cm.
Aliĝado: Ĝis la 13-a de februaro aliĝis entute 655 personoj el 32 landoj.
G.C.Pompilio, K.K.S. - Nieuwe Binnenweg 176 Rotterdam-2, Nederlando.

## 1967-A - JARO DE LA INTERNACIA TURISMO

TURISMO-PASPORTO POR LA MONDPACO = ESPERANTO-PASPORTO POR INTERKOMPRENIĜO

INTERNACIA AMIKA RENKONTIĜO EN JIHLAVA (Ĉeĥoslovakio), ek de la 16-a ĝis la 19-a de julio 1967-a. La jaro 1967-a estis proklamita de UNESCO kiel jaro de internacia turismo. Certe ankaŭ vi preparas vin ĝui vian libertempon per vojaĝado por ekkoni fremdajn landojn. Ni antaŭmetas nian modestan proponon ĝui kelkajn tagojn en nia antikva urbo Jihlava kaj invitas vin al la: "Internacia Amika Renkontiĝo". Kiel interkomprena lingvo estas elektita Esperanto. Urba Nacia Komitato, Komisiono por Trafiko. Aliĝo al: Mést NV, komise cestovniho ruchu, Nàméstì Miru, JIHLAVA - Ĉeĥoslovakio.

TRIA INTERNACIA ESPERANTISTA FERIO. MIEDZYGORZE (Pollando). Septembro 1967-a Feria Fako de Polaj Sindikatoj-Filio en Ladek Zdròj kaj la Okcidenta Regiono de Pola Esperanto-Asocio en Wroclaw elkore invitas vin al la Tria Internacia Esperantista Ferio kiu okazos dum septembro 1967-a en montara ripozloko MEEDZYGORZE (Sudety-montaro). VENU ĜUI FAMAN ORAN POLAN AUTŪNON !
Aliĝo al: Pola Esperanto-Asocio, Okcidenta Regiono, WROCLAW-17, Str. Dubois 3, p.k.8, Pollando.

EŬROPA ESPERANTO-KONGRESO 1967-A EN INNSBRUCK (Aŭstrio), de la 23-a ĝis la 30-a de julio. Du ĉefaj temoj: "Eŭropa Esperanto-Revuo" kaj Eŭropa Esperanto-Servo Turisma". Kotizoj ĝis 1-5-67: Partoprenanto: aŭ.ŝil. 250. Edzino kaj gejunuloj ne pli ol 25 jaroj: aŭ.ŝil. 210. Poste ĝis 1-7-67 respektive aŭ.ŝil. 290 kaj 240. La kotizo inkluzivas la tutan oficialan programon, la rajton utiligi la Loĝigan, Ekskursan kaj Aviadilan Servojn. Partoprenantoj de 52-a U.K. en Israelo, ekflugu tuj post la Eŭropa Esperanto-Kongreso 1967 rekte de Innsbruck al Tel Aviv. Ekflugo: 1-8-1967. Reflugo: 9-8-1967. Prezo Us.dol. 220 (aŭ.ŝil. 5.600,-). Petu aliĝilon kaj Unuan Oficialan Bultenon de Esperanto-Centro, Fünfhausgasse 16, A-1150 WIEN (Aŭstrio).

EŬROPA FERIO-SEMAJNO EN SVISLANDO, de la 3-a ĝis la 9-a de septembro 1967-a La 9-a E.F.S. okazos ree sur la monteto BOLDERN apud Männedorf ĉe la Lago de Zurigo, sed kun nova tre bela programo: Dimanĉe, la 3-an de septembro. Kolektiĝo je la 17,10 en Männedorf antaŭ la stacidomo. Je la horo 17,15 ni veturos buse al sur Boldern kie troviĝas nia ĉarma restadejo. Post vespermanĝo ordigo de la kotizo. Lunde. Libera mateno por promenadi en la arbara ĉirkaŭaĵo. Posttagmeze busekskurso al la beleta Wäggital-lago. Okaze por fari malgrandan rondvetureton sur la kvieta lago kun remil-boato. Marde. Matene jam ni busos trans Sattel al Brunnen, la konata turistika loko ĉe la Vierwaldstättersee. Poste ni plue veturos laŭlonge de la lago trans Vitznau kaj Weggis ĝis Küssnacht a Rigi. La tagmanĝo okazos en bonega restoracio sur la monto Seebodenalp (1030 m.). Posttagmeze buse al Lucerno kie ni vizitos la Svisan Trafikdomon, kiu estas la plej moderna kaj la plej ampleksa en Eŭropo. Merkrede. Tuttaga foresto por vidi la rozan urbon Rapperswil. Ni vizitos kune la interesan, folkloran "Patrujan Muzeon". Poste ekskurso per ŝipo por vidi la insulon Ufenau. Ĵaŭde. Grandioza busekskurso tra beletaj regionoj. Vizito de la kastelo Arenenberg kun la Napoleon-Muzeo. Poste plue buse al Gottlieben. Tie ni fotos la konatan restoracion "Deachenburg", kiu estas unu el la plej belaj rigel-konstruaĵoj en Svislando. Ankaŭ, ni vizitos la mondfaman insulon Mainaŭ, kiu oni ofte nomas: "La insulo de la floroj", ĉar oni trovas tie multajn belegajn florojn, plantojn kaj arbojn el

diversaj kontinentoj. Vendrede. Libera tago por ripozi aŭ propravole ekskursi. Je malbela vetero lumbild-prezentado aŭ interesa prelego. Sabate. Jam matene per trajno al la fama urbo St.Gallen, kiu estas la plej granda urbo de Orienta Svislando. Posttagmeze libervola vizito de la plej gravaj vidindaĵoj de la urbo. Fino. Organiza kaj aliĝa adreso: S-ro Ernst Glättli, Laurstrasse 17, CH-5200 BRUGG AG (Svislando).

ARANĜOJ EN JÄRVENPÄÄ KAJ HELSINKI 12 - 20.VI.1967 de la Internacia Fervojista Kontraŭalkohola Asocio (IEAV), Nordlanda Fervojista Abstinec-Unio (NJAU) kaj Fervojista Abstineca Asocio de Finnlando (RRL). Detalaj informoj kaj aliĝo ĉe S-ro Matti Voltti, Pempoelikatu 25 B 47 HELSINKI 10 (Finnlando).

ESPERANTO-TAGO EN ROMO - OKAZE DE LA INAŬ de LA BILDO DE "NIA SINJORINO DE LA ESPERO""PATRONINO DE LA ESPERANTISTOJ - La 25-an de aprilo 1967-a.

Inaŭguron oficialan de la ĵus pentrita bildo de "Nia Sinjorino de la Espero", Patronino de la Esperantistoj, la 25-an de aprilo, okaze de Esperanto-Tago en Romo, al kiu ekde nun ni kore invitas ĉiujn. Jen la programo, Je la 10 h.: Sankta Meso en la kripto de preĝejo "Cristo Re", viale Mazzini 32. Sekvas kunveno ĉe samloka salono. Komuna tagmanĝo ĉe apuda restoracio. Je la 16 h.: Literatura vespero: prelegos S-anoj Minnaja kaj Prof. Agostini, kun prezento de lumbildoj. Fine, ni klopodos por ke nia Grupo estu ricevata en la ĝenerala aŭdienco de la Papo la postan tagon, t.e. merkrede 26, kaj tiu kaze ni esperas ricevi apartajn benajn vortojn de la Papo.

Ni atendos multajn S-anojn el ĉiuj italaj urboj, por la tute escepta evento. Kaj siavice ili aranĝu siajn aferojn, por resti en Romo ne nur la 25-an sed ankaŭ la 26-an de aprilo por partopreni en la Papa aŭdienco. Ĉiu estas afable invitata persone, kaj ĉiuj italaj grupoj bonvolu disvastigi la sciigon al siaj membroj kaj sendi al Romo almenaŭ po unu reprezentanto.

La bildkarto de Nia Sinjorino de la Espero, fidela reproduktaĵo, sendube plaĉos al ĉiuj, kaj la kosto estas ege malkara: por kvantoj malpli ol cent ekzempleroj: £.20 po ekzemplero; sed £.15 por kvantoj pli altaj ol 100.

40-A S.A.T.-KONGRESO = MALMÖ, 29-a de julio - 5-a de aŭgusto 1967-a
Por skribaĵoj: Elsa Johansson, Vårnhemsgatan 2 A III, Malmö Ö. Svedujo.
Por monsendo: Henry Lindkvist, Rabygatan 30 Malmö S.V. Svedujo.
La Malferma soleno okazos en la Urbodomo de Malmö (konstrujaro: 1546).

10-A DATREVENO EKESTO DE LA ESPERANTO-GRUPO "G.CHIAPPISI" SCIACCA (Agrigento) Sicilio, 20 - 21 de majo 1967-a. Alloga programo! Anoncu vin al Esperanto-Grupo "G.Chiappisi", Via Frangipane, 8 SCIACCA (Agrigento) Italio.

## ADIAŬO DE FERVOJA KARIERO

Je la 27-a de januaro 1967-a kolego K.G.J. DE JONG Prezidanto de I.F.E.F. atingis la 65-an jaraĝon. Je la lasta tago de la sama monato li forlasis la aktivan deĵoron ĉe la Nederlanda fervoja kompanio, kiun li servis dum pli ol 48 jaroj. Dum la lastaj jaroj kolego de Jong estis trakciestro de la Amsterdama Centra Stacidomo, do ne miru ke multaj fervojaj aŭtoritatuloj ĉeestis la oficialan adiaŭan kunvenon. La estro de la Distrikto, S-ro Leerteuwer, en longa parolado skizis la oficistan karieron de la adiaŭanto kaj laŭdis lian energian kontribuon por la plibonigo en la organiza strukturo okaze de la grandaj aliiĝoj en la asocio sekve de modernigado ĉiuterena. Post la oficiala parolado multaj aliaj parolantoj dankis pro la ĉiam bona kunlaboro.

Kiel reprezentantoj de la Esperanto-Movado ĉeestis: la ĉefkomitatano de IFEF kaj Prezidanto de F.E.R.N. kol.Labordus, la IFEF-kasisto kol.Oosterwijk kaj la FERN-sekretario kol.van Leeuwen. Je la sekvonta tago la tuta personaro de la trakciejo havis la okazon adiaŭi la eksiĝantan estron. Grandnombre ili venis kun elkoraj paroladoj kaj multaj donacoj.

Nun nia IFEF-Prezidanto apartenas al la pensiitaj membroj. Ĉiu kiu konas lian viglecon kaj ĉiaman junan energion apenaŭ povas imagi ke jam ankaŭ por li venis tiu tempo. Pli ol antaŭe li havos tempo dediĉi sin al la E-laboro kaj do ni deziras ke li ankoraŭ dum multaj jaroj donu siajn fortojn al nia movado.

## LA SUBSKRIBOKAMPANJO POR LA PROPONO AL U.N.O.

La 6-an de Oktobro 1966-a, seppersona delegacio de UEA sub gvidado de la Prezidanto Prof.Ivo Lapenna transdonis al UNO la peticion pri la lingva problemo; ĝi estis subskribita de 920.954 individuoj, kaj 3.843 organizaĵoj kun 71.165.000 membroj. Oni povas diri ke entute subskribis pli ol 72 milionoj da personoj. Aldonaj raportoj pri pliaj nombroj da subskriboj estos senditaj al UNO. Helpu kompletigi la milionon da individuaj subskriboj! Petu subskribfoliojn de centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176 Rotterdam, Nederlando.

## ŜTATA DISTINGIĜO PRO ESPERANTO

Antaù nelonge la Prezidanto de la Federacia Respubliko Germanujo honorigis la Prezidantonde la Germana Esperanto-Asocio, eksdirektoro de distrikta tribunalo D-ro Wilhelm HERRMANN per la FEDERACIA MERIT-ORDENO UNUA KLASA, pro siaj longjaraj laboroj kaj meritoj atingitaj en la sfero de la lingva interkompreniĝo kaj paca kunlaborado de la popoloj. Per tio samtempe agnoskiĝis la aktiveooj de la Esperanto-movado celantaj enkonduki la Internacian Lingvon en la rilatojn inter la diversaj nacioj. Dum sia pli ol 10-jara aktivado en la germana kaj internacia E-movado D-ro Herrmann sukcesis konsiderinde kontribui al la akcelo de la reputacio de la Fed.Resp.Germanujo en la ekstergermana mondo.

## N I    L E G I S

En la n-ro 9/1966 de la grava revuo "Trasporti Pubblici" (Publikaj Transportoj), ni legis gravan kaj interesan artikolon "La Unua Tutmonda Ekspozicio pri Trafiko kaj Komunikado" de nia Prezidanto Prof.Inĝ. Bernardino LATTANZI DE MONTERUBIAGLIO, Ĉef-Inspektoro de la ĜENERALA DIREKCIO de M.C.T.C. (Civila Motorizado kaj Transportoj Koncesiitaj). La dekdupaĝa artikolo ilustrita per multegaj fotoj, raportas longe pri la Monda Ekspozicio pri Trafiko kaj Komunikado (International Aosstellung des Verkhers, IVA), okazinta en Munkeno de Bavarujo ĝis la 3-a de oktobro 1966, kaj mencias ke en la kvartalo de la Ekspozicio iu placo estis baptita "Esperanto". Iu foto montras "Esperantoplaz".

## D I V E R S A Ĵ O J

ĈEF-GENERALO FRANCO-ALTA PROTEKTANTO DE LA 53-A U.K. La Ĉefo de la Civila Domo de la Ŝtatestro de Hispanujo komunikis al la Prezidanto de Hispana E-Federacio, ke la Ŝtatestro, Lia Moŝto Ĉef-Generalo Francisco Franco-Bahamonde, akceptis la Altan Protektantecon de la 53-a U.K. de E. en Madrid en aùgusto 1968-a.

GRAVA ŜANĜO INTER LA GEFA-GVIDANTOJ. Laù propra deziro, nia kolego kaj amiko Wilhelm BARNICKEL, eksiĝis kiel Redaktoro de "Bulteno-Germana esperanta Fervojista Asocio". Jen la nova Redaktoro: S-ro Willi GRASS el Solingen. Ni kore bonvenigas kolegon Grass en nia rondo kaj salutas amiko Barnickel.

ALVOKO. Nederlandano volos korespondi kaj persona kontakto kun samideanoj, koncerne studado pri historio kaj moderna vinkulturo, ankaù pri folkloro ĉirkaù la vinkulturo kaj rikolto. A,Blickman, Palamedesstraat, 17 HAARLEM, Nederland.

## E S P E R A N T O    E N    L A    R A D I O

RADIO ROMA PLILONGIGAS SIAJN DISSENDOJN. Radio Roma atentigas, ke, ek de la 5-a de marto, la dissendoj okazas ĉiudimanĉe de la de la h.21 ĝis la h.21,20 (laù MET) sur tri ondlongoj: m.30,90; 41,24 kaj 50,08. La aùskultantoj estas varme petataj skribi proprajn impresojn al: Radio Roma E.Casella P.320 ROMA

APRILA PROGRAMO: 2-an S-ta Francisko poeto; 9-an Kasteloj de Latio; 16-an La fama tenoro Beniamino Gigli; 23-an Italaj belartaj urboj: Siracusa; 30-an Kristana mondo. MAJA PROGRAMO: 7-an Tra la literaturo; 14-an Novaĵo el Italujo; 21-an Italaj kanzonoj en Esperanto; 28-an Leterkesto. JUNIA PROGRAMO: 4-an La itala poeto Lodoviko Ariosto; 11-an Italaj belartaj urboj: Padova; 18-an La itala Arkitekto Vignola; 25-an Mezepokaj mozaikoj en la preĝejoj de Romo.

B.B.C. EN ESPERANTO. La eksperimentaj dissendoj de BBC en Esperanto plue okazos laù la jenaj ondoj: 49, 31, 25 kaj 19. La dissendoj okazos ĉiuj vendredoj de la monatoj je la 21,30 h. laù grinviĉa tempo. Skribu viaj opinioj kaj sugestoj.

RADIO VARSOVIO DISAÙDIGAS ĈIUTAGE, de la horo 16,30 ĝis la 17 laù MET, duonhoran programon en Esperanto sur mallongaj ondoj: 25,34 -31,01 -31,45-31,50-41,99-42,11